

La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto (2-a aldono)

D. B. Gregor (Britio) *

La laŭdinda persistemo de akademiano *N. Kawasaki* havigis al ni fotokopiojn de ok aliaj verkoj el la unuaj tri jaroj de Esperanto; kaj kvankam la pacienco de la legantoj povas esti jam streĉita, ili eble ne domaĝos sciigon pri ĉi tiuj forgesitaj verkoj. Jen do ili, laŭ sia pozicio en la jam donita listo (*D. GREGOR* 1974, 1976) kaj kun la novaj kunmetaĵoj, kiujn ili liveras:

- 14a. *VOLAPÜK KAJ LINGVO INTERNACIA (L. Einstein, post junio 1889)*
senpage (ruse: *besplatno*, pole: *bezpłatnie*)
supermezo (germane: *Übermass*)

Rimarkigo: Strange troviĝas “enterparolado” (t.e. konversaciado), kiu do ne estas kunmetaĵo, sed aparta radiko, same kiel la nuna: entrepreno (ĉi tie “enterpreno”).

Mortnaskita: “kaŭzulo” (t.e. aŭtoro, verkisto).

- 19a. *LERNOLIBRO POR LATVOJ (Starptautika walodo) (Libeks 1889)*

(a) “alpropri” (t.e. alproprigi) (*De: zueignen*)

antaŭludo (Ru, Po, *De*)

elpreni (*De*)

kunmeti (Ru: *skladivatj*)

kunvoki (Ru: *sozvatj*, Po: *zwołać*)

(b) ĉiuprintempe (Eo)

(c) eternvivo (Eo)

fulmodio (Eo)

“ludfadeno” (t.e. kordo) (Eo)

Statistiko: 9 kunmetaĵoj, el kiuj 5 prepoziciaj

Lingva fonto: Ru (Po, *De*) 3, *De* 3, Eo 4

Rim.: misformaĵoj “sinĉesi de”, “travidi” (t.e. trarigardi), “vestojbrueto” (kvankam tia formo troviĝas ankaŭ ĉe *Zamenhof*). Stranga la uzo (eble pro la latva) de “je-” kiel prefikso ĉe iuj transitivaj verboj (kp. *D. GREGOR* 1974, 91, n-ro 9 (a)): “jeaŭskulti”, “jefari” (koroneton), “jegardi” (patrolandon), “jemeti” (moneron), “jepasigi” (vicon).

Mortnaskitaj: “elmaltiri” (t.e. elmeti)

“malforgesi” (t.e. memori).

* Magistro, emerita licea profesoro pri la greka, latina kaj itala lingvoj.

- 19b. LA LINGVO INTERNACIA (*Vollständiger Lehrgang*) (de la klubo nurnberga, 1889)
 elfosi (*De: ausgraben*)
 prividi (Eo)
 transpaŝi (*De: überschreiten*)
 Statistikoj: 3 kunmetaĵoj prepoziciaj
 Lingva fonto: *De* 2, *Eo* 1
 Rim.: Prividi supozeble sub la influo de *De: besehen*. La sennoma aŭtoro mem tradukas la du aliajn vortojn.
- 20a. LERNOLIBRO DE ESPERANTO (eld. bulgara de *Bogdanov* 1889)
 mondlingva (*De*)
- 20b. *ENGLISH-INTERNATIONAL VOCABULARY* (*An attempt towards an I.L. by D-ro Esperanto, trans. by H. Phillips*) (inter oktobro kaj decembro 1889)
 antaŭpensi (Eo)
 kelkiu (k.c., Eo)
 senrigardema (Eo)
 bonfarti, bonfarto (*De*)
 Statistikoj: 4 kunmetaĵoj (el ili 2 prepoziciaj)
 Lingva fonto: *De* 1, *Eo* 3
 Rim.: *Phillips* ĉerpis la plimulton el siaj 38 aliaj kunmetaĵoj el EKZERCARO kaj LA OMBRO de DUA LIBRO. Lia "NOMARO" (kp. *D. GREGOR* 1974, 98, n-roj 16 kaj 17) estas tiu ĝis novembro 1888.
- 25a. ESPERANTO OSSIA LA PIÙ PRATICA DELLE LINGUE INTERNAZIONALI (*D. Marignoni*, marto 1890)
 (a) "almiliti" t.e. venki, (Eo)
 alveturi (Eo)
 alvoki (*Ru, De*)
 antaŭpreĝo (Eo)
 antaŭmanĝo (*De: Vorspeise*)
 antaŭsignoj (*De: Vorzeichen*)
 ĉirkaŭskribo (*De: Umschreibung*)
 "deloki" (Eo)
 "depeci" (Eo)
 elmontri sin (Eo)
 elsalti (*De: ausspringen*)
 elstudi (Eo)
 eltrovaĵo (Eo)

- enfermi (*De: einschliessen*)
 “sengardema” (Eo)
 senodora (Eo)
 senutila (Ru: *bespoleznij*)
 subiri (pri la suno) (*De: untergehen*)
 subkuŝi (It: *soggiacere*)
 supervesto (*De: Oberkleid*)
 tralegi (*De: durchlesen*)
 transflugi (Eo),
 (b) nekuracebla (It: *inguaribile*)
 nelogika (It: *illogico*)
 neregula (It: *irregolare*)
 nereconebla (It: *irreconoscibile*)
 nesimila (Ru, *De*)
 netrapasebla (Eo)
 neutila (It: *inutile*)
 plejbonaĵo (Eo)
 “plinombro” (t.e. pluralo) (Eo)
 unuĉevala (Eo)
 unutempe (Eo)
 (c) “librokonduko” (kp. *De: Buchhaltung*, Ru: *ŝetovodstvo*)
 metalfadeno (Eo)
 “ovruĝo” (Eo) (kp. Ru: *feltok jaiĉnij*)
 vitrokulo (Eo)

Statistiko: 38 kunmetaĵoj, el kiuj 23 prepoziciaj, 7 pere de ne- (rimarkeble derivitaj el la itala, sed ankaŭ troveblaj en aliaj lingvoj, kiel la du indikitaj).
 Lingva fonto: *De* 8, Ru 1, Ru, *De* 2, It 6, Eo 21.

Rim.: Sola certa itala devenaĵo ekster la “ne-vortoj” estas “subkuŝi”, kies metafora senco, kvankam utila, estas agnoskita nur de PIV kaj eĉ tie nur absolute (t.e. sen sekva “al”).

“Deveni” estas uzata por: malsupreniri (notu la poetoj!)

“Deloki” aperas verŝajne sub influo de la itala donita signifo: *sloggiare*.

“baldeble” por la longa esprimo: kiel eble plej baldaŭ.

28. *LAEREBOG TIL DET ESPERANTOSPROG* (*Ch. Nielsen*, antaŭ junio 1890)
 plibonaĵo (Eo)
29. *PLENA LERNOLIBRO (Úplná učebnice) POR BOHEMOJ* (*J. Lorenz* 1890)
- (a) “aldiri” (t.e. aldoni) (Eo)
 alkonduki (Ru)

- apudpalaca (Eo)
 “dekuŝigi” (t.e. demeti) (Eo)
 “deŝtupi” (t.e. cedi) (Eo)
 “eldaŭreco” (Ru)
 eldiri (t.e. malkaŝi) (Eo)
 elkapti (Ru)
 enblovi (Ru)
 endoni (Ru)
 entiri (Ru)
 kontraŭkrio (Eo)
 (b) nemalmulte (Ru: *nemalo*)
 nebela (Ru)
 (c) azenoreloj (Eo)
 grandestimata (Ru)
 malfeliĉtempo (Eo)
 malriĉdomo (Eo)
 nacilingvo (Eo)
 orelkuŝaĵoj (? -kaŝ-) (Eo)
 Nigraĉinuĵo (Eo)
 patrinbrusto (Eo)
 radikesprimo (Eo)
 “sciviro” (t.e. erudiciulo) (Eo)

Statistiko: 24 kunmetaĵoj, el kiuj 12 prepoziciaj

Lingva fonto: Ru (kiu ĉi tie reprezentas la ĉeĥan, ekz. “eldaŭreco” (Cs: *vytrvalost*), Eo 15.

Rim.: La Antaŭparolo estas dulingva: Eo, Cs.

Mortnaskitaj: “ununaskita”, “malkrii” (flustri)

☆ ☆ ☆

Plue, letero de s-ro *Boris Kolkov* (el *Ufa*, Sovetio) igis min reekzameni kelkajn kunmetaĵojn en *D. GREGOR* 1974 kaj ŝanĝi la fonton al Ru: nome sur p. 83: pripensado (Ru: *obdumivanie*), senerara (Ru: *bezoŝiboĉnij*), sur p. 85: eltrinki (Ru: *vipitj*, kp. *De*: ...), enverŝi, sur p. 86: elrigardi (Ru: *vigljadivatj*), kunpreni (kp. *De*: ...), priskribo (Ru: *opisanie*), sur p. 88: neuzado kaj post “senpense” aldonu: Ru, sur p. 90: duflanka, nesenskaŭze, sur p. 92: prilabori (Ru: *obrabotivatj*), subaĉeti (Ru: *podkupitj*) kaj en la lasta linio: -jara, -kolora, sur p. 93: neatendite, muskaptilo, sur p. 94: delogi, sur p. 97: senhalte, senvole (aldonu Ru: *bezvolnij*).

☆ ☆ ☆

- Fine, jenaj malgrandaj ŝanĝoj estas farendaj:
- p. 85: post “nepropa” forstreku (duon-)
- p. 90: forstreku “elpensi” k.c. kaj “ĉefurbo” k.c., ĉar nun ili troviĝas en n-ro 6a, kie la mankanta rusa verbo estas: *vidumatj*
- p. 92: post “dekonsili” la verbo devus esti: *otsovetovatj*
- p. 93: forstreku “okulvitroj” (jam p. 85!)
- p. 98: (n-ro 16): post (OV 595) enmetu: Kun nomaro ĝis aŭgusto 1889
(n-ro 17): post (n-ro 5) enmetu: ĝis januaro 1889

☆ ☆ ☆

Kompreneble, ĉiuj nunaj nombroj malaktualiĝis. La legantojn tamen intereso nur la finaj sumoj, origine donitaj sur pp. 101-102 de *D. GREGOR* 1974. Tiuj nun tekstas:

La vort-trezoro kreskis en la unuaj tri jaroj per 813 senafiksaj kunmetaĵoj, el kiuj 313, t.e. 38% havis prepozician antaŭ-elementon. El ĉi tiuj 30 estis mortnaskitaj – pruvo pri la silenta leĝdonado de la esperantistaro.

La lingvaj fontoj estas jenaj:

slava 27% (174, inter kiuj 45 kune kun germana)

germana 18 % (143, inkl. 14 kun angla kaj 1 kun franca, sed ne tiujn kun rusa)

franca 1% (10, el kiuj nur 2 sola)

itala (6, v. n-ron 25a)

Restas do 54% (434) originale formitaj rekte el Esperanto mem, kio demonstracias la naturan dinamismo de tiu ĉi internacia lingvo, kiel jam konstatite.

Referencoj

GREGOR, D.B. (1974): La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto. – *SCIENCA REVUO*, vol. 25, 81-102. *Beograd.*

GREGOR, D.B. (1976): La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto. Korekta aldono al S.R., vol. 25, n-ro 2/3, 1974. – *SCIENCA REVUO*, vol. 27, 153-156. *Beograd.*

The earliest compound words (without affixes) in Esperanto (2nd supplement)

Thanks to S-ro N. Kawasaki, the author could examine 8 more works from the first three years of Esperanto. These produced 83 new compounds, which raises the total to 813, of which 313 (38%) involved a preposition. Of these 813, 27% were Slav, 18% German, 54% original formations in Esperanto. The number of still-born words (30) shows the silent legislation of Esperantists.

Thanks also to a communication from S-ro B. Kolkov of Ufa, USSR, the number of Russian sources in the original article must be increased by 18.